

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2017-07-15 ĝis 2017-10-15.

Eventoj

La plej ĉefaj kaj gravaj eventoj, certe, estis, unue, la **ILEI-kongreso** en Busano, kiu estis perfekte sukcesa en diversaj sencoj – rilate al nombro de la partoprenintoj, al la bunta kaj riĉa programo, al la brila nacia programo kaj ĝenerale al perfekta organizado. Due, prezento kaj agado de **ILEI dum UK** en Seulo. Pri ambaŭ eventoj eblas pli detale legi en multaj raportoj tra diversaj kanaloj. Dum UK la **Tago de la Lernado** havis buntan programon altnivelan. Plie okazis en la Hankuk Universitato **Simpozio** pri la evoluo de la instruado de Esperanto, kiun partoprenis ne nur kongresanoj, sed studentoj de tiu grandega universitato.

Premio Mauro La Torre. Septembre la Estraro kunlabore kun la Familio La Torre vicfoje anoncis konkurson pri esplor-laboro rilate al Eo-instruado. La kampoj estas la samaj, kie laboris la Honora Membro kaj prezidanto de ILEI profesoro Mauro La Torre. Dezirantoj vidu la informon ĉe edukado.net kaj ilei.info. La limdato por anonci sin estas la 1-a de januaro 2018; la limdato por sendi la esplor-laboron – la 30-a de aprilo 2018.

Oktobre la Prezidantino Mireille Grosjean nome de ILEI partoprenis en la 4-a Sud-Azia Seminario en Bengaluro, Barato.

JARO DE LA LERNANTO (JdL)

Kvankam tiu iniciato jam finiĝis, tamen pro la graveco de la temo ĝuste por ILEI la Estaro daŭrigas sian agadon en tiun direkton.

Enkadre disvolviĝas la projekto “**UNU LECIONO PRI ESPERANTO POR ĈIU LERNEJANO**”. Diskutoj startis komence de 2017. La agado estis prezentita en la *Revuo ESPERANTO* en la numero de julio-aŭgusto 2017. La Prezidantino Mireille Grosjean preparis la labordokumentojn, kiuj jam estis uzata en ŝia instruista kariero. Ĉio aperis en la retejo de ILEI <http://www.ilei.info/agado/projektoj.php>. Poste estas lanĉita kreado de alvokoj en diversaj naciaj lingvoj por kontakti lokajn ŝtatajn koncernajn oficejojn. Jam estas preparita kaj prezentita en la paĝaro de ILEI la kompleta franclingva versio. Fine de septembro ĝi estis liverita al la estro de la deviga instruado de la kantono Neuchâtel (Svislando); li transdonos 16 dosierojn al 16 lernejdirektoroj la 24-an de oktobro. Plie la tuta materialo iris al kvin direktoroj de superaj mezlernejoj; tiel la kantono Neuchâtel fariĝas nia provregiono. La Estraro nun klopodas pri tradukado de tiu alvoko en diversajn naciajn lingvojn. Ia kunlaboro estas bonvena!

Vivo de la Ligo

Julie la kasisto William Harris preparis skizon de la **buĝeto por 2018**. Ĝi estis diskutita dum la Komitata kunsido en Busano. La fina aprobo okazos rete.

Septembre pere de la reta diskuto kaj voĉdono estis aprobita la protokolo de la komitata kunsido en Busano. Samtempe, laŭ la Statuto, estis lanĉita de la Prezidantino **renovigo de la Komitato de ILEI**. La proceduro survojas.

Dum la komitatokunsido de ILEI en Busano, Koreio, en julio 2017 venis la peto, ke ILEI provizu al la Movado **liston de siaj diplomitaj geinstruistoj**. Plenumante tiun taskon, Mireille Grosjean septembre komencis kolekti informojn, dokumentojn pri diplomigo de instruistoj pri pedagogio, metodologio. Estis dissendita alvoko al ĉiuj koncernaj personoj, kiuj povas kontribui pere de informigo.

Septembre okazis diskutfazoj kaj poste voĉdonoj pri la 4 novaj sekcioj en Brazilo, Danlando, Katalunio kaj Kubo.

Aŭguste la Estraro lanĉis kreadon de diplomoj por **Honoraj Membroj** de ILEI. Danke al nia serba membro Aranka László estis preparita bela modelo desegnita de Emese Kovács Pécskai. Jam septembre okaze de diversaj personaj renkontiĝoj dum iuj Eo-aranĝoj komenciĝis enmanigo de la diplomoj. Reago de niaj Honoraj Membroj estis ĉiam tre kortuŝa kaj danka. Helpis en tiu kampo la Vicprezidanto de UEA kaj eks-prezidanto de ILEI Stefan MacGill.

Daŭras la nova iniciato de ILEI – **Komuna legado dum Tago de Libro** la 15-an de decembro. Por ĉi-jara kampanjo la Prezidantino Mireille Grosjean proponis kaj preparis la tekston “Esperanto kaj demokratio” de «Verda Majo», Hasegawa Teru, japana aktivulino. En la grupo de ILEI ĉe Facebook “ILEI labortable” aperis informo pri la ĉi-jara teksto.

Kapabligo

Aŭguste estis atingita interkonsento inter ILEI nome de la Prezidantino Mireille Grosjean kaj la mastrino de edukado.net Katalin Kovàts pri kunlaboro en kampo de kapabligo de Eo-instruistoj. Temas pri kelkaj novaj iniciatoj:

1. Dumjara intensa instruista trejnado por Eo-instruistoj EIT, okazonta en du etapoj kaj du formatoj: dumjara distanca teoria-metodika kurso kaj fizika praktika seminario dum la ILEI-kongreso en Madrido en 2018. Septembre estis ellaborita kaj voĉdonita la detala kontrakto inter la Ligo kaj edukado.net. La nova projekto startos la 15-an de oktobro.

2. Ekde 1.1.2018 la membroj de ILEI havos aliron al edukado.net kaj ĉefe al la kolekto de 800 ekzercoj senpage. La kandidatiĝo de la ILEI-membroj iros al la sekcioj laŭ la preciza skemo por faciligi la laboron de Katalin Kovàts en registrado ĉe la retejo. Detala farmaniero sekvos.

Septembre estis voĉdonita ene de la Estraro la decido pri la kontrakto inter ILEI kaj edukado.net pri tiu nova kunlaboro en la kampo de EIT

Laŭ la decido de la Komitato en Busano ILEI kreis laborgrupon, kiu profunde analizos diversajn lernilojn kaj taksos ilin laŭ la niveloj de la KER-sistemo – por ebligi ilian uzon fare de Eo-instruistoj. La grupo konsistas el 7 personoj el diversaj kontinentoj, gvide de Katalin Kovàts. Estis ellaborita plano de esploro kaj la laboro survojas.

La Prezidantino lanĉis la ideon okazigi ekzamenon por blindaj esperantistoj dum la ILEI-kongreso en Madrido aŭ dum UK en Lisbono. La Estraro komencis esplori pri tio kun la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK).

ILEI ricevis petilon por organizado de ekzamensesio ILEI/UEA okaze de TAKE Tut-Amerika Kongreso de Esperanto kaj en Burundo, ambaŭ komence de 2018.

Kongresoj

La 50-a ILEI-kongreso en Busano, Koreio.

En diversaj kanaloj, amaskomunikiloj aperis materialoj pri la unua ILEI-kongreso en Koreio. Vidu IPR-n, JA-n, Youtube-n k.a.

Dum sia unua postkongresa skajp-kunsido 2017.08.19 la Estraro diskutis pri resumoj kaj konkludoj pri la unua ILEI-kongreso. Tri estraraninoj, kiuj partoprenis, rakontis pri siaj impresoj kaj sciigis pri rezonoj de aliaj partoprenintoj. Estis faritaj gravaj rimarkoj kaj proponoj por la sekvontaj kongresoj; notiĝis novaj evoluperspektivoj por la ĉefa ILEI-kunveno.

Krome, la Estraro lanĉis novan iniciaton: esplori opiniojn de la partoprenintoj pri la ĉefa jara ILEI-kunveno. La unua provo estis farita en 2016 en Nyíregyháza flanke de la vicsekretarino Elena Nadikova. Post la analizo de tiuj refleksioj la Estraro decidis okazigi retan enketilon. Kunlaboras Doktoro Duncan Charters el Usono.

Laŭ la decido de la komitato la kasisto William Harris preparas la finan financon bilancon por la korea kaj aliaj ILEI-kongresoj/konferencoj.

Venontaj kongresoj

La 51-a ILEI-kongreso en Madrido, Hispanio.

Septembre la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović vizitis Madridon kadre de la preparado de la kongreso en 2018. La vizito estis densa kaj fruktodona. Jen ĝiaj rezultoj: kompletigis 6-membra LKK kun divido de taskoj; estas serĉataj kaj engaĝotaj laŭbezzone kaj laŭtrove pliaj helpantoj, volontuloj, kunlaborantoj; okazis kelkaj kunsidoj. Estis vizititaj la kongresejo Colegio Mayor Chaminade por pli bone kompreni la kondiĉojn kaj interkonsenti pluprocedon ĝis subskribo kaj plenumo de la kontrakto kaj kelkaj aliaj hoteloj kaj gastejoj kiel alternativaj loĝlokoj. Ili same estas esplorataj por la loĝado kaj kongresumado. Estis interkonsentitaj adapto de la tradicia ILEI-kongresa programskemo kaj horaro al la lokaj manĝkutimoj kaj taga tempouzo; komuna programo por la du komunaj tagoj, sabato kaj dimanĉo, de la du kongresoj – de la 77-a Hispana Esperanto Kongreso HEK kaj de ILEI. Estis diskutitaj programpropono por la ILEI-kongreso, inkluzive junularan programon, kaj kotizpolitiko por ĉiu kongreso aparte kaj komuna

kotiztabelo por partoprenontoj de ambaŭaj kongresoj. Meze de la monato inter LKK kaj la Estraro estis ellaborita aliĝilo por la aranĝo.

Septembre la Prezidantino preparis alvokon por la konkurso pri la emblemo de ILEI-kongreso en 2018. Nun ene de la Estraro estas diskutataj konkursaj reguloj. La konkurso survojas.

Septembre la Estraro dense pridiskutis diversajn aspektojn de la kongresa temo. Apartan atenton estis dediĉita al la kultura programo. Venis de la estraranoj multaj proponoj por pliriĉigo de la kongresa programo, inkluzive novajn eventualajn programerojn. Ĉar unuafoje la kongresanoj profitos du Eo-kongresojn samtempe – de ILEI kaj la Hispanan Esperanto-Kongreson, estas diskutita inter la Estraro kaj LKK la tre favora komuna kotiztabelo. Fine de septembro ĝi estis finkreita pere de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović.

La unua uniformo pri la kongreso en Madrido aperis en IPR 2017/3 kaj en la kalendaro ĉe www.eventoj.hu. Plu la definitivaj informoj kaj aliĝilo aperos en IPR 2017/4 konforme al la Konferenca regularo.

Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj

Aŭguste la Prezidantino Mireille Grosjean kontrolis datumojn de la paĝo de sekcioj ĉe <http://www.ilei.info/instancoj/sekcioj.php> por aperigo en IPR 2018/1.

Septembre-oktobre sekcioj nomumis siajn komitatanojn.

Kontaktoj ekzistas inter la Prezidantino kaj diversaj landoj, kie sekcio povus baldaŭ naskiĝi: temas pri Armenio, Ĉilio, Rusio.

Multaj ĝojigaj novaĵoj venas el AGEI – la germana sekcio de ILEI – de Zsófia Kóródy pri diversaj aktivaĵoj en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. Pli detale eblas legi pri tiu agado en Facebook.

Estraro

Aŭguste la Prezidantino Mireille Grosjean sendis dankmesaĝon al Ivo Vercammen el Belgio, kiu dum jaroj prizorgis la printadon kaj sendadon de IPR. Nun, laŭ la decido de la Komitato en Busano, ambaŭ revuoj – IPR kaj JA – estos printataj en Slovakio.

Aŭguste estis sendita ankaŭ salutmesaĝo al IJK – la Internacia Junulara Kongreso en Aneho, Togolando.

Septembre Mireille Grosjean sendis dankvortojn al niaj samideanoj el Ĉinio, Italio kaj Koreio, kiuj organizas la instruadon de Esperanto al studentoj (mil stevaroj) de la Artkolegio de Kunmingo en Ĉinio.

La Estraro komencis preparadon al la ILEI-Komuna Legado okaze de la Tago de Libro. La Prezidantino jam publikigis anoncon en la FB-paĝo “ILEI Labortable”. Ekzistas ankaŭ aparta Facebook paĝo: <https://www.facebook.com/ILEI-Komuna-Legado-okaze-de-la-Tago-de-la-Libro-1791351147787608/>

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

La Estraro daŭrigis solvodon de la problemo pri nesendo de kelkaj numeroj – IPR 2016/3 kaj 2016/4. La redaktoro Jozefo Nemeth esploras pri represo kaj resendado de du perditaj numeroj al tiuj abonantoj, kiuj ĝis nun ne ricevis ilin.

Aŭguste – septembre la Estraro ellaboris la novan tarif-sistemon por IPR kaj JA laŭ la proponoj kaj diskutoj dum la komitatkunsido en la ILEI-kongreso en Busano. La nova sistemo donas bonajn rabatojn al siaj membroj, kiuj abonos ambaŭ revuojn kaj samtempe zorgas pri la plua prospero de ambaŭ eldonaĵoj por la celoj de la Ligo. Oktobre estis kreita kaj diskutita ene de la Estraro la nomo por tiu kategorio de membreco.

Dum la ĉeesto de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović ĉe la la 83-a IKBE (Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj) en Serbio venis ideo pripensi la teknikajn eblojn por pli vasta disponigo de IPR al niaj nevidpovaj samideanoj. Aŭtune Radojica flanke de la Estraro kunlabore kun LIBE, la redaktoroj de IPR Jozefo Nemeth kaj de JA Stano Marček kaj Sebastian Cyprych, la ILEI komisiito pri membroprizorgado, esploris pri teknikaj ebloj eldoni version de IPR uzeblan por nevidantoj. Sebastian Cyprych preparis la lastan numeron de IPR en EPUB (elektronika libro) – speciala servo por blinduloj, Jozefo – simplekstan UTF-8 varianton. Stano Marcek esploras pri ebloj eldoni. Tio estos la unua provo adapti la revuon por niaj nevidpovaj samideanoj. Estas traktataj ebloj por voĉa eldono de ambaŭ revuoj. Aktive kunlaboras Rob Moerbeek el Nederlando, kaj aliaj anoj de la Ligo Internacia de Blinduloj Esperantistaj (LIBE).

Juna Amiko (JA)

Septembre la Estraro pridiskutis kun la skipo de JA stimulon kaj progreson por la revuo. La celoj estas: pligrandigi la abonantaron kaj altiri la plenkreskulojn al la abono. En la vico staras ebloj eldoni version de JA uzeblan por nevidantoj.

ILEI en la Reto

La Prezidantino kaj aliaj estraranoj regule plenigas la laborgrupojn en Facebook “ILEI labortable”, “ILEI-kongresoj” per la plej freŝaj novaĵoj. Ekzemple, tie estas abunde publikigitaj informoj pri la ILEI-kongreso en Busano, pri agado de ILEI dum UK en Seulo.

Krome, ILEI nun havas kanalon ĉe Youtube – ESPERANTO + EDUKADO ILEI: https://www.youtube.com/channel/UCvxZ3qhmQcFKzTGCR_SLHFg

Kunlaboro kun UEA

La unuan fojon la ILEI-kongreso gastigis ĉi-jare la 38-n seminarion pri Aktivula Maturigo (AMO). Ĝi daŭris dum 4 tagoj kaj konsistis el diversaj programeroj. Gvidis la seminarion la Vicprezidanto de UEA Stefan MacGill kaj la Prezidantino de ILEI Mireille Grosjean.

Pro la anonco pri ĉeso de Katalin Kovàts plu prizorgi la KER-ekzamenojn Mireille Grosjean nome de la Estraro de ILEI sendis al UEA-Estraro alvokon pri kunlaboro cele al solvo de tiu situacio por ĝia plua evoluo kaj insistis pri la valoro de la rilatoj inter Esperanto, fakte UEA, kaj la Konsilio de Eŭropo, kiu prizorgas la KER-ekzamenojn (Komuna Eŭropa Referenckadro pri Lingvoj).

La Estraro de ILEI pripensas la okazigon de la komuna UEA-ILEI simpozio dum la dua ILEI-kongreso en Madrido en 2018.

Daŭre ILEI havas liberan aliron al la paĝoj de la *Revuo ESPERANTO*.

Kunlaboro kun TEJO

Post elekto de la nova Estraro de TEJO la du Estraroj esprimis deziron pli dense kaj efike kunlabori inter si.

Kontaktoj kun aliaj enmovadaj institucioj

La Estraro pripensas novajn kontraktojn kun enmovadaj organizoj cele al nova kunlaboro en diversaj kampoj.

Okaze de la Interlingvistikaj Studoj (IS) en Poznan, Pollando, fine de septembro, okazis renkontiĝo inter Humphrey Tonkin (Usono) (ESF) kaj Tomasz Chmielik (Pollando). Ilia temo estas nova eldono de la Fabeloj de Andersen, tradukitaj el la dana al Esperanto de Zamenhof. Ili havas planon lanĉi konkurson por akiri infanajn desegnaĵojn por ornami la eldonon. Okaze de la 60-jariĝo de CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia) en La Chaux-de-Fonds, Svislando) okazis renkontiĝo de Mireille Grosjean kun Tomasz Chmielik. Aŭdante pri konkurso, desegnaĵoj kaj ĵurio, Mireille Grosjean parolis pri la tri grafikistinoj, kiuj produktis logotipojn kaj diplomojn por ILEI. Tomasz Chmielik proponis, ke ĵurio konsistu el du grupoj, unu estu tiuj tri fakulinoj; temas pri Emese Kovács Pécskai el Serbio, Choi Youn Ji el Koreio kaj Anastasija Stupina el Rusio.

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

UNESKO

Meze de septembro okpaĝaj dulingvaj varbiloj pri ILEI pretiĝis – unu eldono estas en Esperanto kaj la angla, alia – en Esperanto kaj la franca. Mireille Grosjean aktualigis la enhavon de la informiloj kaj pere de la helpo de Stano Marcek liveris ilin al la presejo. Entute estas po milo da ambaŭ varbiloj. 200 ekzempleroj de tiuj varbiloj estis senditaj al la observantoj de ILEI por la oktobra Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo.

Esperanto-rusaj varbiloj pri ILEI kaj informiloj pri Esperanto konsente kun la Estraro estis senditaj de la vicsekretarino Elena Nadikova al la E-klubo en Soĉi, Rusio, kie okazos la XIX Tutmonda Festivalo de Junuloj kaj Studentoj (la 14-22-n

de oktobro) por disdono. Partoprenos en la festivalo 20 000 gejunuloj el 150 landoj.

UIA Internacia Unio de internacie agantaj Asocioj.

En Bruselo la 10-an de novembro okazos la 11-a ronda tablo de tiu tutmonde aganta institucio. Nia belga sekciestro Marc Cuffez partoprenos nome de ILEI.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo ricevu elkorajn dankojn!

Vicsekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

2017-10-15